
# Jos vertelt... - Jos rakontas...

Ni ĉiuj amas arbojn. Sed ĉu ni konas ilin? Ĉiu scipovas distingi inter lekanto, tulipo kaj leontodo. Sed kiu kapablas rekoni je unua vido fraksenon, alnon aŭ aceron? Pripensu, ke tiuj ĉi arboj estis dum nekredeble longa tempo fidelaj kunuloj laŭ la vojo de la homaro. Ili donis kaj donas al ni lignon, fruktojn, ombron kaj oksigenon, kaj tiom da beleco kaj rakontoj. Ili estas la kolonoj de nia socio kaj meritas esti pli bone (re)konataj. Prenu do la tempon fari amikan viziton al la 12 arboj de tiu arbopromenado. Eksciu, kion ili ofertis al ni dum la jarcentoj. Renkontu la alnon, la kratagon, la aceron, la fraksenon, la kverkon, la karpenon, la robinion, la kristodornan glediĉion, la japanan ĉerizarbon, la betulon, la ilekson kaj la pirarbon. Vi malkovros, ke vi sciis multe pli ol vi antaŭpensis, kaj tamen multe lernis. Ekde nun vi rigardos la arbojn pli konscie, kiel amikojn, kiuj pacience atendas vin.



Memore kaj amike
al Jos van Zaalen (1935-2018)
naturhomo kaj homamanto, talenta rakontisto
kaj loĝinto de la Spaarwaterstraat.




1. Frakseno
2. Betulo
3. Glediĉio
4. Alno
5. Pirarbo
6. Karpeno
7. Robinio
8. Acero
9. Kratago
10. Kverko
11. Ilekso
12. Japana ĉerizarbo

Ekzistas tradukoj de tiu ĉi arbo-promenado en aliaj lingvoj.
Trovu la QR-kodon ĉe ĉiu arbo).
Ĉu vi ŝatus helpi per tradukado al via denaska lingvo? Kontaktu nin.

Por tiu ĉi arba promenado disponeblas (presebla) kvizo, en ĉiuj tradukitaj lingvoj, kaj kroma materialo por grupgvidantoj.